



Festivala libro

**Bjelovar
5-a - 12-a de aũgusto 2017**

Misio

INTER-FEST celas fariĝi rekonata eŭropa Esperanto-aranĝo kun vasta gamo da programoj, kiuj al neesperantista medio prezentos praktikan uzeblon de Esperanto kaj pere de tio instigos ĝian lernadon kaj instruadon.

Vizio

INTER-FEST volas kuraĝigi la Esperantan kulturkreadon kaj levi la prestiĝon de Esperanto en la kultura kampo. La programoj de *INTER-FEST* inkluzivas diversajn branĉojn de literaturo, teatro, muziko, filmo, sporto, klerigo, lingvolernado, interkultura interŝanĝo, turismo kaj aliaj aktivecoj, kiuj efektiviĝos per prelegoj, diskutrondoj, seminarioj, koncertoj, prezentaĵoj, konkursoj, sportaj eventoj, kolokvoj, ekspozicioj k.t.p.



Festivala libro

**Bjelovar
5-a - 12-a de aũgusto 2017**



La 100^a mortodatreveno
de Ludoviko Zamenhof
Solenata sub la aŭspicio de UNESKO

ORGANIZANTOJ

Bjelovara Esperantista Societo (BES), Bjelovar
Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE), Zagreb
Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto (UPE), Zagreb
Dokumenta Esperanto-Centro (DEC), Ďurđevac



AŬSPICIANTOJ



**Urbo
Bjelovar**



**Departemento
Bjelovar-Bilogora**

Eldonis: Bjelovara Esperantista Societo
Respondecas redaktoro: Franjo Forjan
Grafike kaj teknike aranĝis: Josip Pleadin

aŭgusto, 2017



Estimataj partoprenantoj de INTER-FEST,
karaj geesperantistoj,

Okazigo de la internacia festivalo INTER-FEST, dediĉita al la 130-jariĝo de Esperanto kaj la centa mortodatreveno de Ludoviko Lazaro Zamenhof, la aŭtoro de ĉi tiu internacia lingvo, estas grandaj honoro kaj ĝojo por nia bela urbo Bjelovar, kiu la Esperantan tradicion gardas jam pli ol unu jarcenton.

La memoron pri Zamenhof, kiu estas unu el la grandaj personecoj de la homara historio, en sia 38-a Ĝenerala konferenco en Parizo en 2015, UNESKO metis sur la liston de tiuj datrevenoj, kiuj sub ĝia aŭspicio okazados en la periodo 2016-2017. Aparte ni ĝojas, ke ankaŭ Bjelovar partoprenas en tiu solenado.

La organizadon de la Festivalo ne senkaŭze oni proponis al Bjelovar. Ni estas tre dankaj al la Bjelovara Esperantista Societo, kiu kun kvardeko da siaj membroj, depost la refondiĝo en 2011, evoluigis tre riĉan aktivecon, bazitan sur la tradicioj el 1909. Niaj esperantistoj elprovis siajn kapablojn per tre sukcesa organizado de la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj, festinte la 100-an datrevenon de la Esperanta traduko de la romano *La trezoro de l' orajisto* de August Ŝenoa, kiun Esperantigis bjelovarano Fran Kolar Krom. Siajn aktivecojn ili daŭrigis dum ĉiuj postaj jaroj per diversaj aranĝoj, el kiuj

aparte valora estas *Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo*, kiun Bjelovara Esperantista Societo organizas jam kvin jarojn sinsekve. La ĉi-jara INTER-FEST estas ne nur programero de tiu aranĝo, sed ankaŭ konsistiga parto de la *Bjelovara kultura somero*.

La festivala temo estas *Kultura kunfandiĝo de la multetna Eŭropo*, kiun oni pritraktos per koncertoj, prelegoj, libreprezentoj turismaj ekskursoj kaj filmprojekcioj, kaj la ekspozicio de infandeseĝnaĵoj titolita *La flugiloj de fantazio* kunligas ĝin kun la statuso de Bjelovar kiel urbo amika al la infanoj.

Karaj geamikoj, bjelovaranoj kaj niaj gastoj, mi deziras, ke la unua INTER-FEST kiel Esperanta kulturfestivalo, fariĝu bona tradicio, kiu fortigos la kulturkreadon en Esperanto, konigos al ni la eblecojn de ĝia lernado kaj instruado, riĉigos la *Bjelovaran kulturan someron*, sed ankaŭ konigos al multaj bjelovaraj gastoj la urbajn vidindaĵojn. Bonvenon!

La urbestro de Bjelovar
Dario Hrebak





Estimataj festivalanoj,

Mi havas la honoron saluti vin okaze de la internacia Esperanta kulturfestivalo INTER-FEST, kiun la Departemento Bjelovar-Bilogora volonte gastigas, sed ankoraŭ pli volonte aŭspicias.

Ĝi estas la festivalo, kiu kunvenigas partorpenantojn el diversaj mondopartoj, dank' al la komuna lingvo – Esperanto. Mi tre ĝojas, ke via aranĝo okazas en la centro de nia Departemento, kiu dum la sekvaj sep tagoj fariĝos dezirinda celloko por la monda esperantistaro.

Antaŭ ni troviĝas la riĉa programo, kiu prezentos diversajn aspektojn de la kulturo, sporto, edukado, sed ankaŭ ebligos al vi interŝanĝon de scioj kaj spertoj. Mi certas, ke ĉi tie naskiĝos multaj amikecoj, kaj ke vi kunportos al viaj hejmoj agrablajn rememorojn.

Dezirante al vi ankoraŭ multajn jarojn da sukcesa laboro kaj reokazigon de ĉi tiu valora festivalo, mi sendas miajn elkorajn bondezirojn al la organizantoj, kaj al la partoprenantoj de la internacia Esperanta kulturfestivalo mi esprimas bonvenigon nome de la Departemento Bjelovar-Bilogora.

La departementestro
Damir Bajsić, dipl. jur.

Sabato (la 5-an de aŭgusto 2017)

10h00-15h00 - Antaŭfestivala ekskurso al Ďurĉevac (Malnova urbo, Galerio de Ivan Lacković Croata).

16h00 - Malfermo de la ekspozicio *Mia unua alfabetlibro* en la Urba muzeo de Bjelovar.

16h00 - Malfermo de la ekspozicio de infandeseĝnaĵoj *La flugiloj de fantazio* en la Urba muzeo de Bjelovar.

18h00 - Prezento de *Oklingva medicina enciklopedia vortaro* de Jozo Marević en la Hotelo Central.

19h00 - Interkona vespero de partoprenantoj en la Hotelo Central.

Antaŭfestivala ekskurso al Ďurĉevac
(*Malnova urbo, Galerio de Ivan Lacković Croata*)

Ďurĉevac, la celo de la antaŭfestivala ekskurseto situas 25 kilometrojn for de Bjelovar. En la urbocentro dominas la fortikaĵo *Stari grad* (Malnova urbo) el la 15-a jarcento, la kultura monumento de Respubliko Kroatio kaj unu el la plej bone konservitaj *Wasserburg*-tipaj fortikaĵoj en la lando. Dum la ekskurso ni vizitos ĝian internon kun la muzeo kaj galerio. La galerio konsistas el kelkaj partoj, el kiuj la plej impona estas Galerio de Ivan Lacković Croata, fama kroata naivarta pentristo, pasia kolektanto de penrtajoj. Sian grandan kolekton li donacis al la galerio de Ďurĉevac. En la fortikaĵo troviĝas ankaŭ moderna multimedia prezento de la loka legendo el la periodo de turkaj konkeroj. Laŭ tiu legendo la defendantojn de la fortikaĵo savis koko, elpafita el kanono al la tendaro de la turka armeo, kiu sieĝis la urbon. Post tiu tempo la loĝantoj de Ďurĉevac portas la kromnomon *Picoki* (kokoj).

En la plej nova tempo la fortikaĵo estas parte restaŭrita, kaj la renovigaj laboroj daŭre okazas. En ĝi troviĝas agrabla restoracieto kaj biertrinkejo, kies servojn laŭdezire povos uzi ankaŭ niaj ekskursantoj. La regionon de Ďurĉevac karakterizas unu el raraj sablaj dezertoj en Eŭropo, kies parto estas protektita kiel natura rezervejo. La lastatempa novaĵo de la urbo estas tute specifa: ekde la pasinta jaro en la bestĝardeneto apud la fortikaĵo vivas kameloj kaj dromedaroj kiel turisma atrakcio.

Prezo: 75,00 kunaĵoj (inkluzivas: busvojaĝon kaj enirbiletojn).

Mia unua alfabetlibro

7



Ĉi tiu ekspozicio prezentas okazon por rememori pri la graveco de tiel natura fakto, kia estas la gepatra lingvo. La vera alfabetigo povas efektiviĝi nur en la origina lingvo de iu homa grupo, favora al tiu medio kaj evoluo de ĝia kulturo.

Ĉi tiu belega kolekto de multkoloraj libroj, unuaj ABC-libroj el la tuta mondo, estas valora kontribuo al disvastigo de la unika ekscio, ke ĉia kulturo, eĉ la plej granda, komenciĝas per la unuaj literoj.

Se iu homa komunumo estas malgranda aŭ malforta, ĝiaj literoj estas des pli gravaj: ĉiun vorton oni kalkulas, kaj ĉiun literon pesas. Kiel lumon de la vero, kiu lumas al ĉiu homo. La lumon de la kulturo.

Ĉi tiu ekspozicio estas vere dediĉita al la plej gravaj libroj en la mondo.



Nikola Rašić, Rotterdam, la 28-an de junio 2017

En la ekspozicio estas prezentitaj 120 alfabetlibroj pri sepdeko da lingvoj el 42 landoj, kolektitaj per helpo de esperantistoj.

La flugiloj de fantazio



Sabato
la 5-an de
aŭgusto 2017
16h00
Urba muzeo
de Bjelovar

Por la ekspozicio de infandesegnaĵoj *La flugiloj de fantazio*, lanĉita kiel kontribuo de INTER-FEST al la statuso de Bjelovar, kiu estas *urbo amika al infanoj*, alvenis 276 infanverkoj en diversaj desegno- kaj pentroteknikoj el 8 landoj. Pro la amaso da ricevitaj verkoj, la organizantoj elektis fakan ĵurion, kiu pritaksis la ricevitajn verkojn. En sia kunveno la 17-an de julio la ĵurio decidis pri la plej bonaj, kiuj estos oficiale proklamitaj en la malferma ceremonio de la ekspozicio, la 5-an de aŭgusto en la Urba muzeo de Bjelovar.

La ĵurio konsistis el:

1. **Miroslav Brletić**, profesoro pri plastikarta kulturo (prezidanto),
2. **Ana Drveni**, arthistoriisto
3. **Milan Pavlović**, profesoro pri plastikarta kulturo kaj arto
4. **Lorena Lukić**, profesoro pri plastikarta kulturo
5. **Berislav Rubčić**, diplomita inĝeniero pri elektrotekniko, majstro-fotisto.

La verkoj estis pritaksitaj en tri aĝo-kategorioj:

Unua kategorio: 0-6 jaroj – infanĝardenoj.

Dua kategorio: 7-10 jaroj – malsuperaj klasoj de elementa lernejo

Tria kategorio: 11-15 jaroj – superaj klasoj de elementa lernejo.

En ĉiu kategorio estas atribuitaj 3 premioj kaj 3-5 laŭdoj. La laŭreatoj ricevos medalojn kaj diplomojn.


Oklingva medicina vortaro

9

**Sabato, la 5-an de aŭgusto 2017
18h00
Hotelo Central (malgranda salono)**

En Esperanto malofte aperas tiel ampleksaj kaj gravaj sciencaj kaj fakaj verkoj, kia estas la **Oklingva medicina enciklopedia vortaro** de **d-ro Jožo Marevič** el Velika Gorica. Tiu libreto kun siaj 3150 paĝoj prezentas eksterordinaran kaj epokfaran eventon, ne nur en Esperantujo, sed ankaŭ pli vaste. La aŭtoro bezonis dek jarojn por verki la vortaron, kiu enhavas la latinan, anglan, francan, germanan, hispanan, italan, kroatan kaj Esperanton.

Krom la aŭtoro mem, la vortaron prezentos lingvisto **Velimir Piškorec** el la Filozofia fakultato de Zagrebo kun kontribuoj de la festivala sekretario **Josip Pleadin** kaj profesorino **Marija Jerković** el Zagrebo.



3150 paĝoj!

**Kutima prezo:
880,00 kunaŭj**

**Festivala rabato:
50%!**



Interkona vespero



**Hotelo Central
en Bjelovar**

**Sabato, la 5-an de aŭgusto 2017
19h00 - 23h00
Hotelo Central (granda salono)**



**Programgvidantino:
Slavica Lovrin**

La *Interkona vespero* konsistos el solena vespermanĝo (kun elektebla menuo 1 aŭ 2), distra programo, amuzaĵoj, tombolo kaj balo kun dancemuziko, ludata de tradicia muzika bando *Stari prijatelji* (Malnovaj amikoj).

**Prezo:
100,00 kunaĵoj
(13,50 eŭroj)
po persono.**

**Trinkaĵoj ne
inkuzivitaj, sed
aparte mendeblaj.**



**Ensemblo *Stari prijatelji*
(Malnovaj amikoj), kiu muzikos por ni**

Menuoj de la Interkona vespero

11

Menuo 1

Bovina supo

Pljeskavica

*(kradrostita miksaĵo el muelita
porka kaj bovina viando)*

Cordon bleu

*(panumita kaj fritita porkaĵo
farĉita per fromaĝo)*

Porka rostaĵo en ĉampinona saŭco

Gratenitaj terpomoj

Krokedoj

Miksita salato

Kuko

Menuo 2

Kokina supo

Panumita kokinaĵo

*(panumita kaj fritita
kokina brusto)*

Viandbuletoj en ĉampinona saŭco

Bilogora steko *(farĉita kokina brusto)*

Rostitaj terpomoj

Legomaĵoj frititaj en butero

Miksita salato

Kuko

**Trinkaĵoj ne inkuzivitaj, sed aparte mendeblaj.
Vegetaranoj anticipe antaŭmendu senviandan menuon!**

Festivala tombolo

Dum la *Interkona vespero* estos vendataj slipoj de la tombolo. Unuopa slipo kostas 10,00 kunaojn, sed ĉiu slipo gajnas. Bonvolu per aĉetado de la tombolo helpi la Solidarecan kason de la Festivalo!

Dimanĉo (la 6-an de aŭgusto 2017)

9h00 - Solena inaŭguro en la Kulturdomo.

11h00 - Komuna fotado de partoprenantoj ĉe la pavilono en la urba parko.

13h00 - Esperanto-konzerto de **Mikaelo Bronŝtejn** en la Altlernejo.

14h00 - Prezento de libro *Fronto aŭ dorso* de **Júlia Sigmund** el Rumanio en la Altlernejo.

15h00 - Projekcio de filmo *Esperanto* de **Dominique Gautier** el Francio en la Kultura kaj multimedia centro.

16h00 - Prezento de libro *Elektitaj Tekstoj pri Internacia Juro* de **Ivo Lapenna** el Danlando en la Kultura kaj multimedia centro.

18h00 - Sankta Meso en Esperanto en la katedralo de Sankta Teresa de Ávila.

19h00 - Konzerto de religiaj kantoj de **Neven Mrzlečki** en la katedralo de Sankta Teresa de Ávila.

20h00 - Nacia konzerto *Bjelovar per koro kantas* en la urba parko, en kiu partoprenas urbaj kaj regionaj kultur-artaj societoj.

Programo de la Solena inaŭguro

1) Kroata himno *Lijepa naša domovino* kaj la Esperanta himno *La Espero* (kantas **Dubravko Kovačević**)

2) Salutletero de la urbestro de Bjelovar **Dario Hrebak**

3) Salutletero de la departementestro **Damir Bajš**

4) Salutparolado de la prezidanto de Kroata Esperanto-Ligo **Anto Mlinar**

5) Du muzikaj eroj de **Neven Mrzlečki**

6) Enkonduka parolado pri la festivala temo kaj la datrevenoj de Zamenhof kaj Esperanto.

7) Saksofona duopo **Jakov Jurković** kaj **Sven Crnković** el la Muzika lernejo, trejnitaj de **prof. Viktor Ključarić**.

8) *Hejme floras, certe, sed...* (rememoro pri Hiroŝimo)

9) Du muzikaj eroj de **Mikaelo Bronŝtejn**

10) Du muzikaj eroj de **Françoise kaj Dédé**

11) Du muzikaj eroj de **Vytautas Tamošiunas**

12) Prezento de la Loka Festivala Komitato kaj omago al Radenko Milošević



**Dimanĉo, la 6-an de aŭgusto 2017
9h00 - 11h00 en la Kulturdomo**



**Programgvidantinoj
Ljerka Stilinović
kaj
Ljiljana Rubčić**



Komuna fotado

Ni petas, ke ĉiuj aliĝintoj partoprenu la komunan fotadon, kiu okazos **dimanĉe, la 6-an de aŭgusto post la Solena inaŭguro (je la 11h00)** ĉe la ŝtona pavilono, kiu estas simbolo de la urbo, troviĝanta en la urba parko.

Komuna foto estas bela dokumento pri la evento kaj kunportinda memoraĵo. Ĉiu aliĝinto povas antaŭmendi la foton je prezo de 20,00 kunaĵoj.

Ĉiuj mendintoj povos ricevi ĝin ĉe la festivala kasistino la saman tagon, do la 6-an de aŭgusto, post la Nacia koncerto.

Koncerto de Mikaelo Bronŝtejn

Mikaelo Bronŝtejn (1949), Esperanta originala verkisto, tradukisto kaj kanzonisto el Tiĥvin (Rusio) prezentos dimanĉan aŭtoran koncerton de Esperantaj kanzonoj. Venu kaj ĝuu!



**Dimanĉo, la 6-an de aŭgusto 2017
13h00 en la Altlernejo**

Koncerta programo:

- 1) *Mi estas kiel vi*
- 2) *Alternativoj*
- 3) *Preĝo*
- 4) *La unua amo*
- 5) *Vi estas la amo*
- 6) *Ĉe la Espero*
- 7) *Kanto de Leganto*
- 8) *Papilia aŭtuno*
- 9) *Limerikoj*
- 10) *Amitaj, amataj, amotaj*

Libroprezento: *Fronto aŭ dorso*



**Dimanĉo
la 6-an de aŭgusto
2017 je la 14h00
en la Altlernejo**

**La libron prezentos:
prof. Zdravko Seleš**

**Elektitajn
ĉapitrojn legos:
Mihaela Cik**

**Festivala prezo
de la libro:
50,00 kunaĵoj**




Júlia Sigmond

Filmprojekcio

15

Por la projekcio estas preta la 64-minuta profesia filmo de franca filmisto **Dominique Gautier** (1953), titolita *Esperanto* kaj eldonita en 2013 de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) en Parizo. Ni uzos ĝian Esperante subtitolitan version. La projekcio okazos kun la afabla permeso de SAT kaj teknika kunlaboro de la Kultura kaj multimedia centro.

**Dimanĉo, la 6-an de aŭgusto 2017
15h00 en la Kultura kaj
multimedia centro**



Ĉi tiu filmo, de la reĝisoro Dominiko Gaŭtiero, proponas vojaĝon tra la mondo, renkonte al la historio de la lingvo Esperanto, al ĝia strukturo kaj al ĝiaj hodiaŭaj parolantoj. Kaptitaj en la diverseco de siaj aktivaĵoj kaj vidpunktoj, la vortoj de tiuj lingvouzantoj interplektiĝas rivelante pecon post peco kiel konkretiĝas ĉiutage la utopio de ties iniciatinto, Ludoviko Zamenhofo.



**[http://www.nodo50.org/esperanto/
Libroservo/DVDEsperantoSAT.htm](http://www.nodo50.org/esperanto/Libroservo/DVDEsperantoSAT.htm)**

Libroprezento: Ivo Lapenna



Okaze de la 30-a mortodatreveno de la aŭtoro

*Bjelovara esperantista societo
havas apartan honoron inviti Vin al prezento de la libro*

Elektitaj tekstoj pri Internacia Juro

*Kultura kaj multimedia centro Bjelovar
Ulica Ivana viteza Trnskog 8e*

dimanĉo, la 6-an de aŭgusto 2017 je la 16h00



*Ivo Lapenna
(1909-1987)*



Ivo Lapenna estas unu el la plej elstaraj personoj de la internacia Esperanto-Movado, multjara prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, nomata *konstruinto de la moderna UEA*. Juristo, londona profesoro de kompara soveta kaj orienteŭropa juro, li estis ankaŭ tre fama Esperanto-oratoro. Li forpasis precize je la Zamenhofa tago kaj ĝuste en la jaro de la centjariĝo de Esperanto. Nun, 30 jarojn post lia morto, ni omaĝas lin per eldono de *Elektitaj tekstoj pri Internacia Juro*, kiun iniciatis konata germana esperantisto

Reinhard Haupenthal. Dum

la libroprezento

Josip Pleadin prezentos

komputilan projekcion pri la riĉa vivo de Ivo Lapenna, kaj muzikan programon prezentos juna violonĉelistino **Blanka Laslo** el Subotica (Serbio), ludante la plej ŝatatan instrumenton de Ivo Lapenna.

Blanka Laslo (19-jara) finis Muziklernejon (violonĉelo) kaj lernis grafikan dezajnon en la Politeknika Lernejo de Subotica. Ekde 2016 ŝi studas violonĉelon en la Muzika Akademio en Debrecen (Hungario).



En la dimanĉa programo okazos ankaŭ la romkatolika Sankta Meso, kiun celebros sacerdoto **Vladimir (Rikard) Patafta** en la Katedralo de sankta Teresa de Ávila en Bjelovar. Permeson por la diservo donis la episkopo de la Diocezo Bjelovar-Križevci, Lia Ekscelenco **Vjekoslav Huzjak**.



*Katedralo de
sankta Teresa
de Ávila en
Bjelovar*



**Dimanĉo, la 6-an de aŭgusto 2017
18h00 en la Katedralo**

*Sac.
Vladimir
(Rikard)
Patafta*



*La delegacio de
INTER-FEST
en la aŭdienco
ĉe monsinjoro
Vjekoslav Huzjak,
la episkopo de la
Diocezo Bjelovar-
Križevci.*



Specialan meslibreton bonvolu preni ĉe la enirejo en la Katedralon antaŭ la diservo.

Koncerto de religiaj kantoj

**Dimanĉo,
la 6-an de aŭgusto
2017
je la 19h00**

La zagreba
operkantisto
kaj esperantisto
Neven Mrzlečki



Post la meso okazos koncerto de religiaj kantoj, kiun prezentos operkantisto kaj esperantisto **Neven Mrzlečki** el Zagrebo. Li prezentos diverslingvajn konatajn melodiojn:

Repertuaro:

- 1) Thomas Champion: *Never Wheatherbeaten Sail* (angla renesanco)
- 2) Johann Sebastian Bach: *O finst're Nacht, wann wirst du doch vergehen?*
- 3) Johann Sebastian Bach: *Jesus, unser Trost und Leben*
- 4) Johann Sebastian Bach: *Bist Du bei mir*
- 5) Georg Friedrich Händel: *Dignare*
- 6) Alessandro Stradella: *Pietà, Signore*
- 7) Georges Bizet: *Agnus Dei*
- 8) Franz Schubert: *Ave Maria*
- 9) Chana Senesh/David Zehavi: *Eli, Eli*
- 10) Mihail Lermontov: *Mi eliras*
(en Esperanto!)
- 11) Josh Groban: *You Raise Me Up*

Lumdisko kun la koncerto de
Neven Mrzlečki el la jaro 2012



Bjelovar per koro kantas

19



Dimanĉo, la 6-an de aŭgusto 2017
20h00 en la Urba parko

Dominantaj *tamburicaj*
muzikinstrumentoj de nia koncerto:
bisernica, braĉ kaj bugarija

En la Nacia koncerto titolita *Bjelovar per koro kantas*, kiu okazos ĉe la pavilono en la urba parko, siajn programojn (parte en Esperanto) prezentos tri kulturartaj societoj:

- 1) Kulturarta societo *Ivan vitez Trnski* Nova Raĉa
- 2) Kulturarta societo *Veliko Trojstvo*, Veliko Trojstvo
- 3) Kroata metiista kaj laborista kulturarta societo *Golub* Bjelovar



Kulturarta societo *Ivan vitez Trnski* Nova Raĉa

Bjelovar per koro kantas

Kulturarta societo *Ivan vitez Trnski* el Nova Rača kontinue aktivas jam 60 jarojn, flegante la originalan folkloron, kantojn kaj popolajn kutimojn de la regiono de Bilogoro. Dum tiu periodo kelkcent societanoj partoprenis en multaj programoj kaj starigis kontaktojn kun 65 similaj societoj en Kroatio kaj aliaj landoj. Ĉiujare ekde 1983, fine de majo la societo organizas folkloran renkontiĝon por flegi la diversecon kaj riĉecon de la folkloro heradaĵo kaj popolaj kutimoj de sia lando. Nuntempe ĝi havas 70 membrojn: kantistojn, dancistojn kaj *tamburica*-ludantojn en kelkaj aĝo-kategorioj. Funkcias 6 sekcioj, el kiuj du *tamburicaj*, du folkloraj, miksita kaj vira kantgrupoj. Gvidantino de la folkloraj sekcioj estas Branka Novković kaj de la *tamburicaj* sekcioj Vladimir Giacometti.

En la koncerto *Bjelovar per koro kantas* ili prezentos:

1. Kanton *Gastejaĉo fine de l' vilaĝo* (en Esperanto),
2. Originalajn kantojn kun la komuna titolo *Sub la tilioj de Rača*,
3. Kanton *Ho, aŭtuna nokto klara* (en Esperanto), plenumatan de Malgranda *tamburica* orkestro,
4. Programeron *La infanoj ŝercas* de la Infana danĝgrupo,
5. Du kantojn plenumatajn de la Miksita kantgrupo,
6. Popolkantojn kaj dancojn de Bilogoro.



Kulturarta societo *Veliko Trojstvo*, Veliko Trojstvo

Repertuaro de la Kulturarta societo *Veliko Trojstvo*:

1) Kanto *Hladan vjetar poljem piri* (prezentota en Esperanto: *Tra la kampo vento blovas*).

2) Tradicia bilogora rondodanco nomata *Gluhak* (sen muzika akompano kaj sen kantado)

3) Tradicia bilogora rondodanco *Svi mi vele da sam s Bilogore* kun akompano de *tamburica*-orkestro.

4) Rondodanco *Zeleni se avlija*, dinamika rondodanco kun akompano de *tamburica*-orkestro.

5) Malferma rondodanco *Bilogorski taraban*.

6) Skudanco *Idi milo*, dancata en festaj okazoj.

7) Kroata kanto *Sunce je zašlo za visoke planine*.

8) Kanto *Plakalo je mlado momče*.

9) Kanto *Kumo moja, kumice*.

10) Tradicia kanto *Prolistala bukovina*.

11) Rondodanco *Igra kolo na Bobovcu*.

12) Bilogora rondodanco *Pasem konja kraj mjeseca*.

13) Vigla bilogora rondodanco *Kolovođo daj kolo povedi*.

14) Bilogora skudanco *Tri jabuke, tri dunje*.

15) Malferma rondodanco *Na ilovoj ladnoj vodi*, kiu serpentumas sur la scenejo.

TRA LA KAMPO VENTO BLOVAS

(*Hladan vjetar poljem piri*)

Tra la kampo vento blovas,
Kaj surtere noktas jam.
Spleno mian koron premas,
Venis jam disiĝ' de l'am'.
Ne iru foren, ho ne, karul',
De koro mia, ke jam pasu brul'.
Ne iru foren, ho ne, karul',
De koro mia, ke jam pasu brul'.

Pri feliĉo hom' ne pensas,
Kiam li posedas ĝin.
Se okaze ĝi forestas,
Malespero regas lin.
Pro la sopiro ja mortas mi
Pro ne libera mia am' al ŝi.
Pro la sopiro ja mortas mi
Pro ne libera mia am' al ŝi.

Tradukis: Zvonko Rehorić





Kroata metiista kaj laborista kulturarta societo *Golub*, Bjelovar

Kroata metiista kaj laborista kulturarta societo *Golub* estas samaĝa kiel Esperanto. Fondita en 1887, ĝi estas unu el la plej malnovaj kulturartaj societoj en Kroatio, kiu povas fieri ankaŭ pri granda kontribuo de esperantistoj. La societo aktivas en kelkaj sekcioj: kantkoruso, folkloro ensemblo, *tamburica*-orkestro kaj infansekcio. La *tamburica*-orkestro kaj la koruso estas la plej malnovaj societaj sekcioj, ĉiam plej popularaj.

Gvidanto de la folkloro sekcio estas Alen Požgaj kaj de la *tamburica*-orkestro Marin Grgić.

Dum la koncerto *Bjelovar per koro kantas* ili prezentos la kanton *Imala je majka tri kéeri jednake* (Patrino havis tri samajn filinojn), *Lipovski-skudancon*, la kantojn *Oj djevojko, djevojčice* (He, knabino, knabineto) kaj *Coprinice* (Sorĉistinoj) kaj skudancon.



Post la Dua mondmilito la plej fortan impulson al la evoluo de Esperanto en Bjelovar donis Dragutin Štokić, profesia muzikisto, gvidinto de esperantista infana *tamburica*-orkestro, kiu poste fariĝis parto de la ensemblo de *Golub*. En la arkivo de *Golub* oni trovis malnovajn partiturojn de *La Espero* el 1923 kaj la originalan marŝon *Esperantista Stevo*, kiun komponis la loka samideano Ivan Barišić dediĉe al la elstara kaj multmerita bjelovara esperantisto Stjepan Maltar.

Lundo (la 7-an de aŭgusto 2017)

9h00 - Ronda tablo pri la festivala temo *Kultura kunfandiĝo de la multetna Eŭropo* en la Altlernejo.

11h00 - La 5-a Deklamkonkurso en la Altlernejo.

14h00 - Esperanto-konzerto de **Neven Mrzlečki** en la Altlernejo.

15h00 - Foiro de ideoj en la Altlernejo.

16h00 - Konzerto de eŭropa muziko de la franca duo *Françoise-Dédé* en la Altlernejo.

19h00 - Prezento de la Esperanta traduko de la romano *La nigra patrino tero* de **Kristian Novak** en la Popola biblioteko Petar Preradović.

20h00 - Internacia konzerto por bjelovaranoj kun partopreno de **Mikaelo Bronštejn** el Rusio, **Neven Mrzečki** el Zagrebo kaj duo *Françoise-Dédé* el Francio.

Festivala temo



**Lundo,
la 7-an de aŭgusto
2017
je la 9h00
en la Altlernejo**

KULTURA KUNFANDIĜO DE LA MULTETNA EŬROPO

La malnova latina sentenco diras: *Varietas delectat* (Varieco ĝojigas). La eŭropa kontinento, kiu tra la historio travivis kaj nuntempe spertas novajn migradojn, estas hejmo de multaj etnoj, nacioj kaj minoritatoj. Ne gravas ĉu ilia miksiĝo okazadis pro la politiko, militoj aŭ ekonomia migrado de gastlaboristoj, la nuntempa Eŭropo spertas kaj

bonajn kaj malbonajn efikojn de tiuj ŝanĝoj. Ekde sia fondiĝo, la granda eŭropa familio de nacioj kaj etnoj, kiu nomiĝas Eŭropa Unio, konsideris la multkulturecon kiel fantastan koncepton, kiu la unuan fojon en la historio, en tia grado agnoskas la diferencojn kaj donas la eblecojn, ke diversaj nacioj kaj minoritatoj esprimu sian identecon en plena senco, uzante pozitivajn jurajn solvojn en la eŭropaj landoj. La multkultureco eĉ pli agnoskiĝas en la nocio *interkultureco*, respektive en la interrilato kaj interinfluo de nacioj kun samtempa konservado kaj evoluigo de propraj identecoj. Pro tio Eŭropo fariĝas ĉiam pli varia.

La avantaĝoj de multkultureco kaj multetnaj socioj estas pli ol evidentaj. Nur se oni jure kaj aktive garantias la egalan pozicion en la socio kaj senĝenan interplektiĝon de ĉies atingiĝoj, oni ebligas la reciprokan konadon, kiu rezultas per toleremo kaj evitigas ksenofobion, malŝaton, netoleremon, kulturan ekskluzivecon, naciismojn kaj sociajn streĉojn.

Eŭropo, sed unuavice Eŭropa Unio diversmaniere stimulas interetnan kaj transliman kunlaboron, kio evidentiĝas en la granda kresko kaj intensivigo de reciprokaj rilatoj ene de la Uniaj landoj, en kunlaboro de lernejoj, civitanaj societoj, entreprenoj, neregistaraj organizaĵoj, sportistoj, sed verŝajne plej intense en la kultura interŝanĝo, al kiu ankaŭ INTER-FEST, kiel malgranda evento, grave kontribuas. Eŭropanoj plejparte, malgraŭ lastatempaj ekscesaj sintenoj de dekstrulaj movadoj kaj naciistoj, konsideras la diversecon kiel normalan aferon. La toleremo en la aktiva, anstataŭ nur en la pasiva senco, ebligas konadon de aliaj kulturoj kaj ilian pli facilan aprobon, kaj aliflanke ebligas al diversaj etnoj esprimi, evoluigi kaj publike prezenti sian identecon en pli vasta socio. La kultura plurismo postulas toleremon kaj reciprokan aprecadon, kiuj aplikiĝas al ĉiu nacio, etno aŭ minoritato egalmezure.

En interplektiĝo de kulturoj kaj interŝanĝo de unuopaj specifaĵoj, okazas ankaŭ laŭgrada kunfandiĝo de iliaj trajtoj, kiuj influas aliajn kulturojn, ĉefe en pozitiva senco.

Esperantistoj mem jam ekde la ekesto de sia lingvo aktivis transnacie kaj peras al aliaj nacianoj la atingiĝojn de siaj kulturoj per literaturaj verkoj, renkontiĝoj, muziko, turismumado ktp.

Bjelovar, la urbo-gastiganto de nia festivalo, estas specifa loko en Kroatio, kie en malgranda teritorio, ekde la tempo de aŭstra-hungara monarkio, harmonie kunvivas dudeko da nacioj. Tial nia festivala temo trovas aparte favoran medion por sinprezento.




Tomasz Chmielik (Pollando)
ESPERANTO KIEL PERILO DE
KULTURAJ VALOROJ

Esperanto kiel perilo de kulturaj valoroj, ĉefe helpata de tradukoj el la nacilingvaj literaturoj, sed ankaŭ el la amplekse komprenata humanistiko kun filozofio, historio, sociologio, arto povas helpi la kulturen kunfandiĝon de la multetna Eŭropo. Precipe ĉi tie, en Balkanio, nur la interŝanĝo de la kulturaj valoroj per la neŭtrala lingvo internacia faciligos klopodojn konstrui pontojn super la fiagado de tiuj, kiuj bremsas interhoman komprenon, kiuj tiel facile elingigas kaj levas la

manon kun „glavo sangon soifanta” anstataŭ ĉiel provi semi pacon, direkti ĉiujn eblajn penadojn por starigi konkordon kaj harmonion. Pravis Edmond Privat, nia granda pioniro, ke venas la tempo por daŭre civilizigi kaj pli efikigi „interpopolan konduton” kun la celo eviti malfeliĉojn, konfliktojn, buĉadojn, kiuj detruas ĉian homecon kaj frakasas la unuecon de la homaro. Ni, esperantistoj, en la multetna Eŭropo proponas la vojon malfacilan, sed en la nuntempo nepre irotan kaj sekvindan.

Georgi Mihalkov (Bulgario)
PONTO AL LA KULTURA KUNFANDIĜO

La problemo de la kultura kunfandiĝo nuntempe estas tre aktuala, ĉar kune kun la disvastiĝo de la kultura interŝanĝo, la etnoj de Eŭropo strebas konservi sian identecon kaj kulturen evoluon. La plej grava tasko de la eŭropaj landoj kaj etnoj estas pli bone ekkoni aliajn naciajn kulturojn. Dank’ al tia kunfandiĝo de la kulturoj de eŭropaj landoj, la eŭropanoj sukcesos ekkoni la morojn kaj tradiciojn de civitanoj en aliaj landoj, kaj tio helpos unuiĝi, amike kunvivi kaj libere interŝanĝi la kulturajn kaj materiajn valorojn. Estas ĝenerala vero, ke nur dank’ al la evoluo de la homa kulturo, oni povas pli bone kompreni unu la alian. La plej granda obstaklo antaŭ tiu ĉi natura homa emo estas la diverseco de la lingvoj. Pro tio Esperanto, la lingvo internacia, estas la plej unika rimedo por la kultura kunfandiĝo de la multetna Eŭropo. Esperanto estas la mirakla ponto, dank’ al kiu la homoj el diversaj eŭropaj landoj povas pli bone ekkoni la kulturajn valorojn de la kontinento kaj pli efike kunlabori.





**Lundo, la 7-an de aŭgusto 2017
je la 11h00 en la Altlernejo**

La Deklamkonkurson en 2013 iniciatis Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto (UPE) el Zagrebo kiel aranĝon por infanoj, kaj ekde la komenco ĝi estis programero de la renkontiĝo *Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo*. De jaro al jaro pligrandiĝas la intereso de esperantistoj por deklamado, kiu okazas en tri kategorioj:

- 1. Lernantoj de elementa lernejo**
- 2. Lernantoj de mezlernejo kaj studentoj**
- 3. Plenkreskuloj**

En ĉiu kategorio la speciale elektita ĵurio aljuĝas tri premiojn, kaj la laŭreatoj ricevos koncernajn medalojn, diplomojn kaj libropremiojn. Aparte oni aljuĝas la konkursan pokalon al la plej bona deklamanto, senkonsidere pri la kategorio.

Ĉi-jare la konkurso okazas la kvinan fojon, sed escepte kiel parto de INTER-FEST, do la eblecon por partopreni havas ĉiuj aliĝintoj de la festivalo.

La konkursa ĵurio konsistas el:

- 1) Lidia Ligeza** (Pollando)
- 2) Georgi Mihalkov** (Bulgario)
- 3) Mikaelo Bronŝtejn** (Rusio).

La Deklamkonkursa moderatoro estos **Zdravko Seleš** kaj en la paŭzo muzikos sur violonĉelo **Blanka Laslo** el Subotica (Serbio).

Koncerto de Neven Mrzlečki

27



**Lundo, la 7-an de aŭgusto 2017
je la 14h00 en la Altlernejo**

Repertuaro:

Franz Schubert: *Serenado*

Francesco Paolo Tosti: *Idealo*

J. Groban/B. Graham: *Vi levas min*

D. Hristodulu/M. Theodorakis: *Malĝojo*

F. Ĉiraki/I. pl. Zajc: *Adiaŭo al hejmo*

A. Ĉenoa/tradicia: *Memoru min*

T. Zuppa/Z. Runjić: *Laro kaj mia*

Z. Stipišić/Gibboni: *La reĝino*

V. Juretić/J. Badurina/J. Frleta: *Mia feino*

Marko Novosel: *Sub oldaj tegmentoj*

A. Bešenić/Z. Špišić: *Larmo por la
montetoj de Zagorje*

Foiro de ideoj

**Lundo, la 7-an de aŭgusto 2017
je la 15h00 en la Altlernejo**

FOIRO DE IDEOJ estos iomete neformala programo, vera foiro dum kiu vi povos prelegi, diskuti en grupoj, proponi ideojn, preni kaj disdoni reklamilojn, informi pri viaj aranĝoj, vendi kaj interŝanĝi Esperantaĵojn, ekscii novaĵojn k.t.p. Nepre kunportu la bezonatan materialon kaj ideojn!

Dum la Foiro funkcios la Libroservo, kie vi povos aĉeti librojn kun konsiderindaj rabatoj. Subtenu la eldonistojn kaj samtempe aĉetu valorajn librojn je favoraj prezoj!

Koncerto de Françoise kaj Dédé

Lundo, la 7-an de aŭgusto 2017
je la 16h00 en la Altlernejo



Duo Françoise kaj Dédé el Francio, per violonoj kaj akordiono ludos aron da diverslandaj melodioj.

Urbomapo

En viaj festivalaj sakoj vi trovos specialan urbomapon, sur kiu estas klare signitaj festivalaj ejoj kaj gravaj institucioj kaj reklamataj interesaj restoracioj kaj kaferoj, el kiuj kelkaj ofertas rabaton al festivalanoj. Por uzi tiun avantaĝon, nepre ĉiam portu vian festivalan nomŝildon.



Libroprezento: Kristian Novak

29

Lundo, la 7-an de aŭgusto 2017
je la 19h00 en la Urba biblioteko



Kristian Novak



Speciale por INTER-FEST en Esperanto estas eldonita la tre sukcesa romano de novgeneracia kroata verkisto **Kristian Novak** *La nigra patrino tero*, kiu en 2014 estis proklamita la plej bona kroata romano laŭ opinio de T-portalo.

La romanon prezentos prof. d-ro **Velimir Piškorec** kaj prof. **Zdravko Seleš** kun partopreno de la tradukinto **Josip Pleadin** kaj provleganto **Tomasz Chmielik**.



**Festivala prezo
de la libro:
80,00 kunaĵoj**

Kiel temon de la romano la aŭtoro elektis la eksterordinaran serion da sinmortigoj en malgranda intermuria vilaĝo komence de la Patrolanda milito en Kroatio en la 1990-aj jaroj. La centran rolon ludas juna kaj talenta verkisto Matija Dolenčec, kiu travivas la krizon de identeco.

*Velimir Piškorec
kaj Zdravko Seleš*

Internacia koncerto



Lundo,
la 7-an de aŭgusto
2017
je la 20h00
en la urba parko



REPERTUARIO DE MIKAELO BRONŜTEJN

Vladimir Visockij (tradukis Mikaelo Bronŝtejn): *Kanto pri amiko*

Mikaelo Bronŝtejn: *Adieu, Paris*

Malnova kozaka kanto (en la rusa)

Mordeĥaj Gebirtig (tradukis Mikaelo Bronŝtejn): *Kanto pri la ora lando*
(parte en la jida)

Ukraina popola kanto (tradukis: Andreo Rogov): *Lun' en ĉielo*
(en la ukraina kaj en Esperanto)

REPERTUARIO DE NEVEN MRZLEČKI:

A. C. Jobim: *Garota de Ipanema*

L. Bonfá: *Manhã de carnaval*

Consuelo Velázquez: *Bésame mucho*

L. Aguilé: *Cuando salí de Cuba*

A. Lara: *Solamente una vez*

E. di Lazzaro: *Chitarra romana*

A. Califano: *Vieni sul mar*

A. Bixio/B. Cherubini: *Violino tzigano*

M. Hadzidakis: *Ta pedia tu Pirea*

G. Seferis/M. Theodorakis: *Sto perijali*

REPERTUARIO DE FRANÇOISE kaj DÉDÉ:

Sciigota surloke.

Mardo (la 8-an de aŭgusto 2017)

10h00 - Malfermo de pentraĵekspozicio *Azia paletro* de la korea pentristo **Ho Song** en la Urba muzeo.

12h00 - Prezento de du bulgaraj libroj: *Brakumi la mondon per Esperanto* de Nikola Uzunov kaj *La viro el la pasinteco* de Julian Modest en la Altlernejo.

13h00 - *Ni lernu la kroatan*, mallonga lingvokurso de **Marija Jerković** el Zagrebo en la Altlernejo.

15h00 - Prezento de infanlibro *Tikiriki Tok el Strobilo* de la israela aŭtorino **Luiza Carol**.

16h00 - **Tomasz Chmielik** el Pollando prezentas literaturan kunlaboron de kroataj kaj polaj esperantistoj en la Altlernejo.

Azia Paletro

Mardo, la 8-an de aŭgusto 2017
je la 10h00 en la Urba muzeo




Ho Song (naskita en 1953) estas magistro pri pedagogio, instruisto de la korea lingvo kaj Esperanto. Ekde 2000 li prezentas siajn pentraĵojn en komunaj ekspozicioj kaj ĝis nun havis dekon da individuaj ekspozicioj en diversaj landoj (Ĉinio, Japanio, Rumanio, Kroatio) ĉefe dum Esperantaj aranĝoj.

Krom la malfermo de la ekspozicio, la artisto, dum sia restado en la Festivalo, klopodos instrui al vi portretadon kaj skribadon de ĉinaj ideogramoj.

Libroprezentoj: Uzunov kaj Modest

Mardo, la 8-an de aŭgusto 2017
je la 12h00 en la Altlernejo



Festivala prezo
de la libroj:
50,00 kunaĵoj

Brakumi la mondon per Esperanto estas memuara prozo de **Nikola Uzunov**, unu el la ĉefaj figuroj de la bulgara Esperanto-movado dum kelkaj jardekoj. La aŭtoron, forpasintan fine de 2016, per ĉi tiu libro omaĝis la Esperantista domo pri kulturo el Razgrad, kiu eldonis la libron.

La viro el la pasinteco estas la dua eldono (2017) de la novelaro, originale verkita en Esperanto kaj unua foje eldonita en 2015. La aŭtoro estas unu el la plej sukcesaj prozverkantoj inter la bulgaraj esperantistoj Julian Modest (=Georgi Mihalkov), kiu mem parolos pri ambaŭ libroj.



Mardo, la 8-an de aŭgusto 2017
je la 13h00 en la Altlernejo

Ni lernu la kroatan

Bazajn regulojn de la gramatiko, skribo, prononcado kaj enkonduko en la historion de la kroata lingvo instruos al vi profesorino **Marija Jerković**. La partoprenantoj de la mallonga kurso povos trejniĝi en la legado, interparolo kaj skribado de ĉi tiu sudslava lingvo.

Libroprezento: Luiza Carol

33

**Mardo,
la 8-an de
aŭgusto 2017
je la 15h00
en la Altlernejo**

*La prezentata libro
kaj la aŭtorino
Luiza Carol
el Israelo*



Tikiriki Tok el Strobilo estas kolekto de 9 simpatiaj porinfanaj rakontoj, antaŭe aperintaj dise en la periodaĵoj. La libro estas ilustrita per interesaj plenkoloraj pentraĵoj kaj fotoj.

**Festivala prezo
de la libroj:
50,00 kunaĵoj**

Pola-kroata eldona kunlaboro



**Mardo,
la 8-an de
aŭgusto 2017
je la 16h00
en la Altlernejo**

Por povi realigi ĉiam pli komplikajn kaj ampleksajn eldonprojektojn, iniciate de Tomasz Chmielik el Pollando dum kelkaj pasintaj jaroj organiziĝis grupo da diverslandaj kunlaborantoj, eldonejoj kaj sponsoroj, kies komuna laboro spronis la Esperantan eldonadon, donis al ĝi novan entuziasmon kaj levis la kvaliton de Esperantaj eldonaĵoj al la profesia nivelo. La novaj cirkonstancoj rezultis per intensa eldona periodo, kiu al la Esperanta merkato ofertis kelkdekon da valoraj libroj, kies amplekso grave superis la ĝisnunajn. Indas menci la novajn eldonojn de *Quo vadis* kaj *Sinjoro Tadeo*, la ampleksekan *La pupo*, represojn de la verkoj de Baghy, Privat, Lejzerowicz, Hodler k.t.p. Kelkajn el tiuj belaj eldonaĵoj vi povos aĉeti en Bjelovar, sed se vi estas ŝatanto de literaturo kaj libroj, ni volonte akceptos vin en nian rondon.

34 Tuttaga pikniko en Veliki Grđevac



Centro Mato Lovrak



Naĝbasenoj en Veliki Grđevac

Veliki Grđevac estas malgranda vilaĝo, en kiu vivis kroata porinfana verkisto **Mato Lovrak**, kies du romanoj estas tradukitaj en Esperanton. Lia romano *La trajno en la neĝo* en 2016, dum la Universala Kongreso de Esperanto en Nitra, estis proklamita *Infanlibro de la jaro*. Ni vizitos specialan Kulturcentron de Mato Lovrak en tiu vilaĝo, kie ni piknikos kaj amuziĝos en neformalaj programetoj, kantado, muzikado, sportludoj k.t.p. Kontraŭ la prezo de 60,00 kunaĵoj vi ricevos busvojaĝon kaj modestan tagmanĝon. Kunportu bankostumon! Se vi volas mendi ankaŭ tagan bileton por la lokaj naĝbasenoj, necesas krompagi 15,00 kunaĵojn.

**Belartaj
konkursoj
de UEA:
*Infanlibro de
la jaro*
2015**



**Festivala prezo
de la libro:
70,00 kunaĵoj**



Mato Lovrak

**Merkredo,
la 9-an de
aŭgusto 2017
je la 9h00**

ZAGREB, STUBICA kaj KUMROVEC



Ĵaŭdo,
la 10-an
de aŭgusto
2017
je la 7h00

Prezo:
225,00
kunaŭj

Zagrebo estas la ĉefurbo de Kroatio, enlanda centro de Esperanto ekde 1908 kaj lastatempe tre ŝatata turisma celo, en kiu ni vizitos plurajn gravajn vidindaĵojn kaj almenaŭ kelkajn ZEO-jn, kiuj ekzistas en la urbo. En Zagrebo vivis fama rusa Esperanto-poeto **Nikolao Ĥoĥlov**, kiu tie verkis sian poemaron *La Tajdo*. Ni rakontos al vi lian vivhistorion pasigitan en Zagrebo.

Gornja kaj Donja Stubica estas vilaĝoj en la regiono norde de Zagrebo. En Gornja Stubica okazis la kamparana ribelo en 1573, kiun en sia romano *Kamparana ribelo* priskribis la kroata verkisto August Ŝenoa. Ni vizitos la okazejon de tiu historia evento.

Kumrovec estas pitoreska vilaĝo en kiu naskiĝis la eksa prezidento de Jugoslavio **Josip Broz Tito**. Ni vizitos lian naskiĝdomon kaj la etnografian vilaĝon.



Nikolao Ĥoĥlov



VARAŽDIN kaj TRAKOŠĆAN



**Vendredo,
la 11-an
de aŭgusto
2017
je la 7h00**

**Prezo:
225,00
kunaĵoj**

Varaždin estas baroka urbo, konata pro sia multjara muzika tradicio. Ni vizitos la tieajn vidindaĵojn: la burgon kaj la famegan tombejon, kiu estas unu el la plej belaj park-monumentoj en Kroatio.

Trakošćan estas unu el la plej belaj kaj plej imponaj kasteloj en Kroatio, konstruita en la 13-a jarcento. Kune kun la apudaj konstruaĵoj, parko, arbaro kaj lago, ĝi prezentas protektitan historian tutaĵon.

ESPERANTISTOJ DE BJELOVAR AL SIA URBO

En la Popola biblioteko Petar Preradović (en la vitrinoj de la teretaĝo kaj la unua etaĝo) estas starigita ekspozicieto Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo, vizitebla inter la 21-a de julio kaj 12-a de aŭgusto. Ĝi estas instigilo al la urbanoj viziti la programojn de INTER-FEST.

Festivala folio

Dum la festivala semajno aperados speciala informilo Festivala folio, en kiu ni publikigos raportojn, informojn pri la programoj kaj eventualajn shanghojn. Festivalanoj bonvolu raporti al ni pri iu el la viditaj kaj partoprenitaj programeroj. Mallongaj, sed informriĉaj artikoloj estu ilustritaj per interesaj fotojn, sendotaj al: **esperanto.bjelovar@gmail.com** aŭ portotaj papere al la sidejo de DEB, Ulica Ivana viteza Trnskog ĉiutage ĝis la 20h00.



Filatela koverto kaj poŝta stampo



En viaj festivalaj sakoj vi ricevos unu ekzempleron de speciala filatela koverto, eldonita okaze de la Festivalo. Ĝi estas stampita per speciala stampo, uzota laŭ la permeso de Kroata poŝto en la poŝtoŝtanco 43000 Bjelovar **nur** la 7-an de aŭgusto 2017. Se vi bezonas pliajn kovertojn, vi povas aĉeti ilin ĉe la akceptejo je 10,00 kunaĵoj. Se vi volas, ke viaj bildkartoj aŭ leteroj estu stampitaj per speciala stampo, la 7-an de aŭgusto iru al la poŝtoŝtanco (Gajeva 2). Ĉe la aŭtomato prenu vian vicnumeron elektante: **E-EVO TV, Krediti HPB, osiguranje**. Kiam la ekrano montros vian numeron, iru al la ĝiĉeto numero 11, kie vi povas aĉeti poŝtmarkojn kaj stampi viajn poŝtaĵojn. **Oni ne povas uzi tiun ĝiĉeton sen atendi en la vico!**

Situo de ĉiuj festivalaj ejoj estas klare signita sur la urba mapo, kiun la festivalanoj ricevis en siaj festivalaj sakoĵ! Ĉi tie ni ripetas la adresojn, labortempon kaj aliajn sciindajn detalojn.

URBA MUZEO DE BJELOVAR – Gradski muzej Bjelovar

Adreso: Trg Eugena Kvaternika 1

Telefono: +385 43 244 207

Labortempo por vizitantoj: marde-vendrede 11h00-19h00; sabate kaj dimanĉe 9h00-13h00. Lunde fermita.

HOTELO CENTRAL

Adreso: Ulica Vatroslava Lisinskog 2

Telefono: +385 43 243 133

KULTURDOMO - Dom kulture

Adreso: Ivana Mažuranića 6

Telefono: +385 43 241 112

ALTLERNEJO – Visoka tehnička škola u Bjelovaru

Adreso: Trg Eugena Kvaternika 4

Telefono: +385 43 241 201

KULTURA KAJ MULTMEDIA CENTRO – Kulturni i multimedijски centar Bjelovar

Adreso: Ul. Ivana viteza Trnskog 8e

Telefono: +385 43 217 471

URBA PARKO - Gradski park

Adreso: Trg Eugena Kvaternika

KATEDRALO DE SANKTA TERESA DE ÁVILA - Katedrala svete Terezije Avilske

Adreso: Ul. Vatroslava Lisinskog 1

Telefono: +385 43 638 639

AKCEPTEJO funkcios

– **la 5-an de aŭgusto** (sabato) en la **Hotelo Central** (Adreso: Vatroslava Lisinskog 2) inter la 10h00 kaj 15h00;

– **la 6-an de aŭgusto** (dimanĉo) en la **Kulturdomo** (Adreso: Ivana Mažuranića 6) inter la 8h00 kaj 9h00;

– **la 7-an de aŭgusto** en la **Altlernejo** (Adreso: Trg Eugena Kvaternika 4) inter la 13h00 kaj 15h00.

Ekster tiu horaro la akceptejaj deĵorantoj estos kontakteblaj antaŭ ĉiuj programoj en la Altlernejo.

TAKSIO: +385 99 222 6720 (Taxi Željko)

Bjelovar ne havas publikan transporton, sed ofte uzatas taksioj. Starto de enurba taksia veturado kostas 20,00 kunaĵojn kaj inkluzivas 4-kilometran veturadon. Ĉiu aldona kilometro kostas 5 kunaĵojn. Ĉiuj loĝejoj uzataj de niaj festivalanoj, krom la tranoktejo *Vita Nova* atingeblas kontraŭ 20,00 kunaĵoj. Tamen antaŭ ol ekuzi taksion, bonvolu informiĝi pri la prezo.

LOĜEJOJ

SOBE MRAK: Daruvarska 94; telefono: +385 98 377 849

APARTMANI PAJIĆ: Tome Bakača 15a; telefono: +385 43 247135

SOBE ZORIĆ: Vukovarska 10f; telefono: +385 43 226 046

APARTMANI MATIĆ: Ul. Antuna Mihanovića 41; telefono: +385 98 730 222

VITA NOVA: Klokočevac 1a; telefono +385 43 247 720



**Bjelovarsko-križevačka biskupija
Dioceso Bjelovar-Križevci**

Trg Eugena Kvaternika 5
43000 Bjelovar

**CVJETNI ATELJE
MARINA**

**FLORA ATELIERO
MARINA**

Ul. Vatroslava Lisinskog 4,
43000 Bjelovar
Telefona: +385 43 243 444

ČESKÁ OBEC



BJELOVAR

**ČESKÁ OBEC BJELOVAR
ČEĤA KOMUNUMO BJELOVAR**

Ul. Andrije Kačića Miošića 28
43000 Bjelovar
Telefona: + 385 43 243 982



**MUZIKLERNEJO
VATROSLAV LISINSKI**

Ul. Vatroslava Lisinskog 1
43000 Bjelovar
Telefona: +385 43 243 416



URBA MUZEO DE BJELOVAR

Trg Eugena Kvaternika 1
43000 Bjelovar
Telefona: +385 43 244 207



HOTELO CENTRAL

Ulica Vatroslava Lisinskog 2, 43000 Bjelovar
Telefona: +385 43 243 133



KROATA TURISMA UNUIĞO



KAFEJO KAJ DOLČAŽEJO ZAGORJE

Ulica Ivana viteza Trnskog 15
43000 Bjelovar
Telefona: +385 43 244 333



KRAŠ nutraĳindustrio a.s.

Ravnice 48
10000 Zagreb
Telefona: +385 1 2396 111



KULTURCENTRO MATO LOVRAC

Ulica Petra Preradovića 23
43270 Veliki Grđevac



KULTURA KAJ MULTIMEDIA CENTRO

Ul. Ivana viteza Trnskog 8e
43000 Bjelovar
Telefona: +385 43 217 471



Trg John F. Kennedy 6B, 10000 Zagreb
Telefona: +385 1 2323 377



POPOLA BIBLIOTEKO PETAR PRERADOVIĆ

Trg Eugena Kvaternika 11
43000 Bjelovar
Telefona: +385 43 243 065



OPĆINA VELIKI GRĐEVAC KOMUNUMO VELIKI GRĐEVAC

Trg Mate Lovraka 3
43270 Veliki Grđevac
Telefona: +385 43 461 666



Tome Bakača 10 a, 43000 Bjelovar
Telefona: +385 43 246 900



Ulica Hrvatskog proljeća 10a, 43000 Bjelovar
Telefona: +385 43 220 380



telecroatian network

Badovinčeva ul. 7, 10000, Zagreb, Telefono: +385 1 2337 777



**Institucio por profesia
rekapabligho kaj postenigo
de invalidaj personoj**

Avenija Marina Držića 1
10000 Zagreb
Telefono: +385 1 6444 493



**TURISMA ASOCIO
DE URBO ZAGREBO**

Kaptol 5
10000 Zagreb
Telefono: +385 01 4898 555



ZVONE d.o.o.

Gornje Plavnica 1/L
43000 Bjelovar
Telefono: +385 43 261 111
zvone@bj.t-com.hr



TURISMA UNUIĜO BILOGORA-BJELOVAR

Trg Eugena Kvaternika 2
43000 Bjelovar
Telefona: +385 43 243 944
Retadreso: info.tzbb@gmail.com



TURISTIĈKA ZAJEDNICA
BJELOVARSKO-BILOGORSKE ŽUPANIJE

TURISMA UNUIĜO DE LA DEPARTEMENTO BJELOVAR-BILOGORA

Ulica dr. Ante Starĉevića 8
43000 Bjelovar
Telefona: +385 43 221 928



TEKNIKA ALTLERNEJO BJELOVAR

Trg Eugena Kvaternika 4
43000 Bjelovar
Telefona: +385 43 241 201



Ul. Matice hrvatske 24, 43000 Bjelovar
Telefona: +385 43 244 050



HORKUD GOLUB

Franka Wintera 6
43000, Bjelovar
Telefono: +385 43 244 475



SAMBI d.o.o.

Hrvatskog Proljeća 1
43000 Bjelovar
Telefono: +385 43 226 066
<http://www.sambi.hr>

*Sinceran dankon al ĉiuj aŭspiciantoj,
kunlaborantoj, sponsoroj, funkciuloj de
departamentaj kaj urbaj institucioj kaj al
bonvolemaj civitanoj de Bjelovar, kiuj per
sia plenkora kaj multflanka subteno al nia
Festivalo, faris el ĝi memorindan eventon.*

Loka festivala komitato



Ovo izdanje izrađeno je uz financijsku podršku Grada Bjelovara.

Sadržaj ovog izdanja u isključivoj je odgovornosti Društva esperantista Bjelovara i ni pod kojim uvjetima se ne može smatrati kao odraz stajališta Grada Bjelovara.



LOKA FESTIVALA KOMITATO

Sidas (de maldekstre): *Josip Pleadin* (sekretario), *Zdenka Polášek* (kasisto), *Frano Forjan* (prezidanto), *Marija Jerković* (viceprezidantino), *Nenad Margetić* (komitatano). **Staras** (de maldekstre) komitatanoj: *Roberto Maglica*, *Jasna Piščević*, *Ljerk Stiliновиć*, *Željko Sakš*, *Slavica Louvin*, *Mirjana Sakš*, *Damir Matašin*, *Grozdana Grubišić-Popović* kaj *Berislav Rubčić*.